
Esperanto sub la Suda Kruco

Numero 4 —Julio-Aŭgusto 1993

N 43



Organo de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj

ISSN 1039-9380

Esperanto sub la Suda Kruco

Oficiala organo de la Esperanto-Asocioj de Aŭstralio kaj Nov-Zelando

Redaktoro: Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Bakers Hill WA 6562, Aŭstralio. ☎ (09) 574 1307.

Libroservo: Tom Elliott, PO Box 230, Matraville NSW 2036, Aŭstralio.

EN ĈI TIU NUMERO:

ARTIKOLOJ:

Nia plej grava vortaro-projekto (Donald Broadribb) 3

Deziras korespondi 4

La montoj de Mourne (Eddie Hearne) 5

Koro kaj kapo (Trevor Steele) 8

La drogsklavo (Ralph Harry) 10

Kiu diris tion? (citaĵkvizo 10) 13

La signifo kaj uzo de la vorto "vakero" (Bernard Golden) 17

Pasporta Servo 1993 16

Latinaj citaĵoj en Esperanto (Ralph Harry 19

Diversaĵoj 24

El la regionoj 25

La NZEA-Kongreso 1994 (Kostoj) .. 26

LIBRO:

Adamo kaj Eva. Malgranda Romano por Komencantoj (rec. Bernard Golden) 22

English Supplement ..... centre pages

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO VERKU ARTIKOLON!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de *Esperanto sub la Suda Kruco*: "Ni vere bezonas artikolon pri..."? Do sendu tiun amatan eseon, ideon, rakont(et)on, esprimon de vidpunkto, ŝercdesegnaĵon. Vi povas sendi viajn verkojn al ni tajpitajn aŭ sur 3½-colaj diskoj Macintosh aŭ MS-DOS.

Se vi sendas manuskripton, bonvolu atenti: la teksto devas esti klare tajpita kun duobla spaco inter la linioj. Tajpu per freŝa rubando sur nur unu flankon de ĉiu folio. Netajpitajn manuskriptojn ni ne akceptas.

Por konservi la lingvan nivelon de ĉi tiu gazeto la redaktoro rajtas korekti ĉiun tekston antaŭ aperigo. Laŭbezone ĝi povos esti mallongigita de la redaktoro. Ni ne povas promesi aperigon en la tuj sekvonta numero, krom se temas pri io kronologie urĝa.

Pri la enhavo de artikolo respondecas nur ĝia aŭtoro. La publikigo aŭ nepublikigo de artikolo indikas nek aprobon nek malaprobon de ĝia enhavo fare de la redaktoro aŭ de la eldonantaj Asocioj.

Absoluta limdato por ricevo de kontribuoj por nia venonta numero: 27 aŭgusto.

NIA PLEJ GRAVA VORTARO-PROJEKTO

DE DONALD BROADRIBB

Lastmomente, dum mi preparis la enhavon de nia maja numero, atingis min ekzemplero de la tri-voluma *Plena Pekoteko,* kaj iom poste la komputilaj diskoj sur kiuj la presita verko estas bazita.

Dum la jardekoj tre granda nombro da teknikaj terminaroj aperis. Kie ili nun troviĝas? Teknikaj vortaroj ne multe vendiĝas, maloftege represiĝas, kaj plejparte estas nekonataj de fakuloj post kelkaj jaroj. Krome, ili tre rapide malaktualiĝas. Kiel oni povas prepari teknologian vortaron kiu nek elĉerpiĝos nek eksdatiĝos, estos daŭre aktualigata, kaj povos konstante plikompletiĝi?

Rüdiger Eichholz, direktoro de la Sekcio de Fakaj Vortaroj de la Akademio de Esperanto, elpensis solvon de la dilemo. Komputiloj ebligas efektivigi grandskalajn projektojn. Se ĉiuj fakvortaroj povus kuniĝi en unu vortarego elektronika, ĉiu fakulo povus ne nur trovi detalojn pri ĉiuj jam proponitaj terminoj sed ankaŭ povus aldoni pliajn kiam bezono ekokazas.

Tio estas tre praktika plano. La kosto de elektronika vortarego estas tre malgranda. Oni povas aĉeti komputildiskon kapablan enhavi pli ol 160 mil esperantajn vortojn je prezo ĉ. $2.50. Ĉiuj fakvortaroj ĝis nun preparitaj por Esperanto povus kune troviĝi sur nur kelkaj tiaj ordinaraj, ĉiutagaj diskoj, kaj esti utzataj per ordinara ĉiutaga komputilo.

La vorto *Pekoteko* estas mallongigo de la plena titolo ***Per-ko**mputora **te**r**mino-kolekto.*** La projekto estis komencita en 1985, kaj espereble daŭros dum multaj jaroj, ĉar dum plu evoluos teknologio, plu devos evolui la koncernaj esperantaj teknikaj terminoj.

Malsimile al niaj tradiciaj fak-vortaroj, la elekto kaj pritraktado de individuaj terminoj en la *Pekoteko* ne estas laŭ la arbitra volo de unu aŭ du kompilantoj, sed ĉiuj interesataj fakuloj povas partopreni per enmeto de siaj propraj opinioj — kritikante jamajn proponojn aŭ difinojn, proponante aliajn, diskutante la dezirindecon de ĉiu esperanta termino. Krome, kaj plej grave, fakuloj povos uzi terminojn sciante ke aliaj fakuloj povos trovi ilin en sia (*Pekoteka*) vortaro, do sen la risko kaj la bezono eterne per piednotoj klarigi la celatan signifon.


La projekto ankaŭ ebligas ke unuopaj terminoj estu proponataj, ekzamenataj, diskutataj malkaŝe kaj kun la kunlaboro de ĉiu interesato. Ne ĉiu persono volas aŭ povas verki tutan fakterminaron, sed unuopaj personoj ja ofte havas opiniojn pri la dezirindeco de individuaj terminoj. Kiam eldoniĝis la *Aŭstralia-Esperanta Vortaro* 3a eldono montriĝis ke multe da diskutado estas bezonata, sed mankis forumo por tiu diskutado.

Esperantistoj plejparte — inkluzive de emeritoj—multon scias pri unu aŭ pli da fakoj. Tial la *Pekoteko* ne estas utilaĵo nur por profesiuloj, sed por ĉiu kiu scias iom pri io ajn, ĉu metio, ĉu profesio, ĉu hobio.

Nunmomente, kompreneble, nur malgranda proporcio da esperantistoj posedas komputilojn. Kaj la *Pekoteko* ja estas perkomputila verko. Krome, ne ĉiu senkomputila aŭstralazia esperant-

isto havas US$90 por aĉeti la presitan tekston de la aktuala versio de la *Pekoteko.* Tial, por interesatoj kiuj nek havas komputilon nek povas aĉeti la presitajn volumojn, mi pretas provizi printitajn kopiojn de la koncerna parto de la *Pekoteko* por iu fako je la preparkosto, t.e. 6¢ aŭstraliaj por ĉiu presita paĝo, plus poŝtsendkosto, kaj helpi pri la enkomputiligado de proponoj, komentoj, diskutoj. Se vi ne scias ĉu fako pri kiu vi interesiĝas jam prilaboriĝis en la *Pekoteko,* vi ja povas skribi al mi demandante.

Por tiu kiu posedas aŭ havas eblon uzi komputilon, la komputilversio de la *Pekoteko* haveblas je la kosto de la diskoj mem. T.e. 3½-colaj diskoj por Macintosh (uzanta MS Word), aŭ IBM (uzanta Word Perfect). Ensume: 10 MF2DD aŭ 5 MF2HD. Sendu la necesajn diskojn plus resend-afrankon al mi kaj nepre informu ĉu vi volas Macintosh- aŭ IBM-registron.



[NB La *Pekoteko* surdiska en ASCII-formato haveblos post kelkaj monatoj; sur 5¼-colaj diskoj la IBM-teksto—WP aŭ ASCII—mendeblas ĉe Rüdiger Eichholz, Esperanto Press, Balieboro Ontario KOL 1BO, Kanado.] ❑



Adreso de la Korespondservo de AEA: Betty Aulsebrook, 51 Lakeview Crescent, Forster NSW 2428. La originalajn leterojn de la ĉisubaj korespondemuloj oni povas havigi ĉe tiu adreso.

/ Gerasina Tanja, flat 64, 65 Leningradskaja Str, Salavat, Baŝkirija 453200, Rusio. 17-jara. Ŝatas legadon, arton, tenison, muzikon (klasikan, popularan), intencas instrui la anglan lingvon.

/ Abdol Jaafar, Nouvelle Cité, Degueche 2260, Tozeur, Tunizio. 25-jara. Parolas la anglan, franca, araban lingvojn, deziras lerni plibone Esperanton.

/ Giljaka Tatjana, Shostka Pyo, P.K. N49, SU 245110, Somska obl-, Ukrajno. 28-jara virino, du infanoj. Kolektas poŝtmarkojn, pupojn en naciaj vestoj.

/ Costa Augusto, Costarella D'Olivazzo 1, 53043 Chiusi (SI), Italio. 28-jara brazilano. Loĝas jam sep jarojn en Italio. Interesiĝas pri aliaj kulturoj kaj interesoj de aliaj.

/ Grudniewski Tadeusz, ul Sambora 2, PL 83-130 Pelplin, Pollando. 44-jara instruisto, viro. Interesiĝas pri kulturoj, politiko, kaj virtemoj.

/ Geneviève Bouko-Levy, 1 Rue Martinaud-Deplat, 13000 Aix en Provence, Francio. Interesiĝas pri Esperanto, kaj pri ĵurnaloj de Aŭstralio kaj aliaj landoj.

/ Eugeniusz Piasecki, ul J Matejki 2, 67400 Wschowa, Pollando. Kolektas aŭstraliajn poŝtmarkojn, deziras inerŝanĝi poŝtmarkojn.

LA MONTOJ DE MOURNE
DE EDDIE HEARNE

Mi opiniis ke eble mi verkis tro, tamen, antaŭnelonge mi ricevis leteron de virino kiu estis en nia Koburga Esperanta Grupo antaŭ 60 jaroj. Ŝi vidis unu el miaj artikoloj en *La Aŭstralia Esperantisto*, do eble mi ne estas tro tedema.

Promenadi en la kamparo estis nia ĉefa distraĵo, kaj dum 1964 ni plejparte promenadis en la kamparo de Britio dum dek monatoj.

Dum ni estis en Skotlando, al Vena rompiĝis brako. Ni planis vagi en Irlando dum unu monato, kaj iris al kuracisto por konsilo. Li estis afabla kaj maljuna. Li interesiĝis pri paro da pli-ol-sesdekjar-uloj kiuj iras kun dorssakoj en la kamparon. Kiam mi diris ke ni grimpis la Cuillins [Montetojn] en Skye, li diris ke li vizitis Skye kaj alte estimis nian fortikecon. Post ekzameno, li diris ke se Vena zorgos kaj portos la brakon en nepeza skarpo, ŝi povos ĝui la viziton. Li salutis nin bonhumore.

Ni iris per ŝipo al Dunleary, la haveno de Dublino. La vento blovadis, kaj pluvadis. Multaj estis malsanaj kaj kelkaj patrinoj havis malĝojan taskon zorgante pri la plorantaj infanoj. Granda ŝanĝo venis al la vizaĝoj kiam ni iris sur la kvietan akvon de la haveno.

Ankoraŭ pluvadis kaj iom mallumiĝis. Dum ni staris heziteme, juna paro kiu ankaŭ venis per la ŝipo invitis nin al granda Porjunulara Gastejo.

Eble pro la pluvo, multaj junaj homoj estis antaŭ la oficejo kie mezaĝa virino estris kapable. La estrino diris ke ŝi havas liton por mi sed ne por virino. Tamen se Vena estus kontenta, ŝi povos aranĝi matracon sur la planko de la Komuna Ĉambro. Du aliaj junaj virinoj ankaŭ havis lokon apud Vera,

Nin tre plaĉis la estrino, kiu donis specialan atenton al mi. Ĉiam afabla al ĉiu kiu agas laŭ la reguloj, ŝi estis tre severa al mallaboremuloj kiuj provas eviti taskojn, ekz. purigi potojn kaj manĝilarojn.

La sekvan tagon ni iris per trajno al Nord-Irlando. Ni devis ŝanĝi trajnojn ĉe la landlimo. Mi estis maltrankvila pro timo ke eble mi devos malplenigi nian grandan dorssakon. Sed kiu suspektus maljunan promenanton pri portado de pafiloj aŭ viskio? La doganisto ridetis al ni kaj faris krucon sur niaj pakaĵoj.

Nia unua plano estis viziti la "Montojn de Mourne". Ili havis allogan nomon, kaj mi bone memoris ĝin kiam mi studis geografion. Ni eliris el la trajno ĉe Newry kaj Vena tuj iris al la necesejo.

Mi montris niajn biletojn al la staciestro. "Reeniru la trajnon, ĝi portos vin preskaŭ la tutan vojon." Mi rigardis lin, kiu pretigas forsendi la trajnon. "Ĉu vi povos atendi iome?" dum mi rigardis al la necesejo. "O.K." Li ridetis, kaj Vena eliris. Ŝi havis malfacilecon rilate la pantalonon pro la skarpo.

Mi helpis ŝin eniri la trajnon kaj ĝustigis la pantalonon dum afabla irlandanino ridetis. Ŝi miris pro niaj pakaĵoj kaj ni babilis pri niaj vagoj. Norde kaj sude, ni ĉiam trovis la Irlandanojn afablaj kaj helpemaj. Ni

tute ne pensis ke povis esti tiom da malamikeco. Ni ja estis bonŝancaj iri tien dum tiu tempo.

Ni butikumis por nutraĵo kaj ankaŭ por mola pilko. La gastejestrino en Dublino sugestis ke pilko estus bona por ke Vena ekzercu sin je utiligado de la fingroj de la difektita brako.

Knockbarragh Gastejo situis alte en selo. Ne multaj personoj estis tie. Ĝi estis tute komforta kaj ni povis elrigardi feliĉe al la pluvo. Tagiĝo venis kaj ni iris al la kuirejo por matenmanĝi antaŭ ol la junuloj leviĝos. Ni eliris je 9.30.

La vojo estis mallarĝa kaj grimpendis laŭ valo. Kiam ni alvenis la selon, ni trovis belan vidaĵon de multaj etaj kampoj. "La Montoj de Mourne" estis antaŭ ni. Multaj malgrandaj grupoj da ŝafoj kun nigraj vizaĝoj kaj kruroj estis en la etaj kampoj.

Ni iris al rivereto, la suno elnubiĝis kaj ni haltis por manĝi kaj ĝui la varmecon. En la distanco ni vidis novaspektan konstruaĵon. Estis nova Gastejo Kinnahallo, belsona nomo. Unue ni intencis pluiri sed ni estis tentataj, la kuracisto en London konsilis ke ni ne tro agu antaŭ ol la brako de Vena tute resaniĝos.

Ĉe la Gastejo ni povis sidi kaj rigardi belan bildon trans valo. Multaj malgrandaj farmbienoj kun blankmuraj domoj. Maldekstre la erikkovrita tero leviĝis al montoj. Vena kaj mi estis tute kontentaj pri nia unua tago.

Tiun nokton estis senprepara koncerto. Viro el Aberdeen kun siaj belaspektaj edzino kaj filino estis ĉe proksima tablo. Li ludis buŝharmonikon tre lerte. Baldaŭ dekduo da gejunuloj kantis, knabino el Glasgovo ludis flaĝoleton kaj knabo el Dumfries gitaron. Duo da beletaj glasgovaj knabinoj kantis harmonie kaj tre bele. Tre nevole la estrino devis ĉesigi la koncerton je la 11a horo. La enlitiĝa horo estis 10 ptm.

La sekva tago estis sunbrila, do ni decidis grimpi la plej proksiman monton Slieve Muck ["muck" = koto, fango]. Stranga nomo, ŝajne Slieve signifas Pinton. Ni promenis laŭ kampara vojo kiu grade supreniris al la monto. Preter malgranda akvejo ni komencis grimpi la krutan monton. La supro, kvankam nur 2200 futojn alta, donis belan vidaĵon. Pli da montoj maldekstre kun granda akvejo en valo. Rekte antaŭ ni kaj tre malsupre estis la maro, dekstre estis Carlingford Lago kaj Dundalk Golfo. Etaj ŝipoj estis videblaj. Ni trovis herbkovritan lokon kiu estis ŝirmata de tre antikva rokmuro kontraŭ la vento. Kun niaj dorsoj ĉe la muro ni elprenis la termobotelon plenan de teo. Kiom ofte ni havis belegan manĝoĉambron!

Revenante ni vidis etan ruĝan veturilon sur la vojo. Ne estis eĉ unu domo en la valo. Dufoje aŭtomobiloj haltis apud la ruĝa veturilo kaj poste daŭrigis sian iron. Kiam ni venis apuden, ni vidis ke ĝi estas vendejo de glaciaĵoj. Ni baldaŭ tre ĝuis du grandajn glaciaĵojn kovritajn per ruĝa frambaĵo. Mirinda surprizo en tia senhoma loko.

Tentis nin ripozi ĉe Kinnahallo plian tagon pro la brako de Vena, sed ŝi diras ke ŝi estas tute kapabla. Do, la sekvan tagon ni komencis promeni la dekunu mejlojn al Newcastle.

Estis sunbrila tago kaj ni ĝuis vagi preter paŝtejojn kun fojfoje beletaj domoj. Ni admiris la etajn garbarojn da fojno kaj la bele konstruitajn fojnamasojn. Post kvin mejloj farmisto venis en permotore funkciigata malalta fojnveturilo. Ni ĝuis la akompanon dum du mejloj, kaj la amikecan

konversaciadon.

Li estis ĉirkaŭ kvardekjara. Li diris ke li havas du parcelojn. La plej multaj farmistoj tie laboras por luigantoj, tamen li luaĉetas de la registaro kaj post dek jaroj li estos tute libera je ŝuldoj. Mi demandis pri la nigrevizaĝaj ŝafoj. Li diris ke ili estas speciala specio "Monto-Mourne Nigrovizaĝo". Fojfoje oni aldonas "novan sangon" de skotlandaj montŝafoj. Ni gaje adiaŭis kiam li foriris al la alia parcelo.

Per trajno kaj du busoj ni iris laŭ la marbordo al Cushendall kie ni devis promeni nur duonmejlon al Gastejo. La sekvan tagon ni decidis grimpi al alta ebenaĵo ĉe la alia flanko de la urbeto Lurigethan. Ĝi leviĝis krute kaj estis tiel proksima al la maro ke ĝi aspektis tre impona. Ni iris laŭ la valo ĝis ni trovis kvietan vojon kiu iris paralele kun la longa ebenaĵo de Lurigethan. Baldaŭ Vena ĝuis matenmanĝon de rubusberoj kiuj kreskis ĉe la flanko de la vojo. Mi ĝuis la rubusberojn sed eĉ pli ĝuis etendi mian brakon por alpreni special-gustan beron por Vena, kaj rigardi la feliĉan vizaĝon...

Ni intencis promeni al la Digvojo de Gigantoj. Eĉ kiam mi estis dekjarulo en Skotlando mi sciis pri ĝi kaj jen mi povas konduki mian edzinon al ĝi.

La Nacia Kuratoraro faris bonajn piedvojojn mezalte laŭ la krutaĵo, ili havis manrelojn kaj estis bona promenejo por rigardi la sovaĝan maron unuflanke kaj la perpendikularan krutaĵon ĉe la alia flanko. Unu parton oni nomis La Orgentuboj. Iom for estis similaj kolonoj sed ili estis torditaj dum ili estis varmegaj antaŭ milionoj da jaroj. La Digvojo mem havis specialan intereson por mi. Ĝi estis la supro de kolonoj kaj grade malaltiĝis al la maro. Mi rimarkis ke la kolonoj havas 4, 5, 6 kaj 7 flankojn. Mi ĉiam supozis ke ili estas sesflankaj.

Vena kaj mi estis tre lacaj kiam ni trafis buson al Gastejo. La juna Estro bonvenigis nin kaj prezentis min al la multaj gastoj kiel la "Knabon el la Sovaĝa Kolonio". Li tre serioze demandis al Vena: "Ĉu vi vere edziniĝis kun ĉi tiu homo?" (Vena ne povis porti la edzin-ringon pro siaj ŝvelintaj fingroj.) Vena ridis kaj mi tuj diris: "Ne, ŝi nur venis por elekti belan irlandanan knabinon por mi." Tio estigis multe da ridado. Ni jam estis geeedzoj de kvardek jaroj. Kelkaj tre seriozemaj germanaj junuloj tute ne komprenis la spritecon de la Estro, kiu multe sed bonhumore ridtrompis ilin.

La estro montris al ni kelkajn antikvajn eltrovaĵojn kaj fosiliojn prenitajn el la loko, ankaŭ sagpinton kiu tre eble apartenis al la Pokala Popolo.[1] Tre interese.

De Derry ni iris per buso al loko kiu estis nur kelkaj mejlojn for de nia gastejo Learmont Kastelo. Kia bela vidaĵo, malnova konstruaĵo kun rondaj turetaj kolonoj ĉe ĉiu angulo. Larĝa impona ŝtuparo leviĝis al la pordego kaj interne duobla ŝtuparo kondukis al la unua etaĝo. Vena tre amis tiajn malnovajn gastejojn. Tiun ĉi grandan konstruaĵon regis afabla virino kies edzo laboris por la Departemento de Arbaroj. Ŝi bonvenigis nin kaj donis por ni grandan litĉambron kies fenestro estis super la enirejo kaj elrigardis al arbaro kaj rivereto. Multe da pluvo falis, do ni estis bonŝancaj.

La Estrino diris ke la kastelo havas fantomojn, sed, dum ni sidis apud granda pinŝtipa fajro manĝante la fantomoj ne ĝenis nin kvankam estis

[1]Beaker Folk. Nomo de antikva popolo.

nur kvar aliaj gastoj en tiu granda kastelo. Ni bone dormis dum la brueto de la pluvo...

Gorton Gap Porjunulara Gastejo estis ĉe la rando de pinarbaro. La estrino estis kara 80jara S-ino Collins, kiu iom dorlotis Venan. Ni tre ĝuis esti tie. S-ino Collins invitis nin al sia aparta domo kiu estis apud la enira kradpordo. Ŝi montris al ni multajn gratulkartojn el ĉirkaŭ la mondo pro ŝia okdeka naskiĝtago. Ni tre ĝuis babiladi, kun taso da teo. Kiam ni revenis al la Komuna Ĉambro la gejunuloj kantis ĉirkaŭ la fajro kun la muziko de gitaro kaj banĝo sed ni ĝuis ĝin de niaj litoj.

La sekvan matenon ni foriris frue kaj silente pasis la dometon de S-ino Collins sed ŝi elvenis kaj iris al la kradpordo por adiaŭi nin. Ŝi donis al Vena branĉeton de blanka eriko. Ni havis senton de malĝojo lasante tian belan virinon kaj foriris kun sento de humileco. S-ino Collins estis vidvino dum 15 jaroj kaj restis aktiva kaj utila. Ja mirinda homo, bona ekzemplo de kiel akiri feliĉon per sindediĉo. ❑

KORO KAJ KAPO

DE TREVOR STEELE



Mi atingis la vilaĝon iom post noktiĝo. Vidinte policiston, mi petis kaj ricevis permeson tendumi sur la tereno iom eŭfemisme nomata "parko". (Ofte tio estas kontraŭleĝa—oni estas devigata tranokti ie, kie pago endas.)

Mi ĵus ekstarigis la tendon, kiam iu veturigis sian aŭton tre proksimen kaj demandis malafable, "Hej, homo, kion vi faras tie?" Turninte min, mi respondis trankvile, "Ĉio en ordo. Policisto permesis." La voĉo tre ŝanĝiĝis. "Mi volas nur proponi, ke vi tranoktu ĉe mi. Jen mia apartamento maldekstre. Mi veturos aĉeti manĝon, sed vi iru kaj sentu vin hejme ĉe mi. Vi trovos lakton en la fridujo."

Kaj fakte la viro tre malavare gastigis min. Nur kelkajn horojn poste li kvazaŭ preterdire informis, ke lia unua intenco estis forĉasi min, ĉar li supozis, ke mi estas "nigo" [Angle, "nigger"].

Tiu incidento ilustras ion, kion mi ofte spertis en centra Kvinslando: bonan koron kaj limigitan kapon. Preskaŭ ĉie mi renkontis spontanean malavarecon. Mi citu nur kelkajn ekzemplojn.

Pli da fojoj, ol mi povus kalkuli, veturigantoj haltis kaj proponis transporti min—ĝis nun mi ĉiam malakceptis. Ofte dua demando estas, ĉu mi bezonas akvon aŭ manĝaĵojn. Malgraŭ mia neo oni foje insistas, ke mi akceptu Coca Cola-n aŭ fruktojn—tri fojojn homoj veturis al la plej proksima vilaĝo kaj revenis al mi kun fruktoj, tiel mem perdinte tempon.

Kompreneble la ĉareto kun miaj posedaĵoj, kiun mi tiras, ĉie ekigas konversacion (estas ja malofte, ke iu piedmarŝas en ĉi tiu lando de la aŭto). Eble la uzo de la ĉareto anstataŭ aŭto kredigas, ke mi estas ekstreme senmona, ĉar tre ofte butikistoj donas al mi rabaton. Foje kafejestroj

donacas manĝon aŭ eĉ invitas min kunmanĝi. Iun tagon mi eniris vilaĝeton kun loĝantaro de eble kvardek kaj viro demandis, "De kie vi venis?" "De la orienta marbordo." "Je l'Infero! Homo tiom marŝinta meritas manĝi flav-ventrulon[1] kaptitan en la Rojo Cooper!" Tiu fiŝo estas ĉiukaze frandaĵo, sed kiam oni ĵus marŝis kvardek kilometrojn... Cetere ĉe tiu laŭte sakranta sed brue amanta familio mi ĝuis amuze vulgaran konversacion kaj komfortan se ne tute puran liton, kaj oni insistis lavi miajn vestojn.

Mi vidis tute alian "vizaĝon" de negocisto, ol li kutime montras al la mondo. Li migris kiel knabo el Eŭropo, vivis seninterrompe en tiu urbeto, konstante se malrapide pliriĉiĝante, estas rigardata kiel "avarulo" kaj provis elimini el sia vivo ĉian "aventuron" krom fojan aĉeton de akcioj. Sed ĉar mi sukcesis interŝanĝi kun li kelkajn esprimojn el lia denaska lingvo, li "adoptis" min: dum mi ripozis du tagojn tie, mi rajtis uzi unu el liaj neuzataj butikoj kiel loĝejon, mi estis gasto ĉe lia tablo, kaj—interesa nova rolo por mi—li uzis min ("Vi bone parolas angle") por iniciati aĉeton de ankoraŭ alia butiko. Kiam mi volis ekmarŝi de tiu urbeto, li petegis min ne daŭrigi mian senpafilan ekspedicion, ĉar...

Jes, kial? Ĉar li vere timas, ke diversloke sur mia intinero estas malbonaj nigruloj. Jen refoje tiu blinda punkto: tuta grupo da homoj ricevas tiun malŝatnomon "nigoj". Inter la malagrablaĵoj de la vivo estas senpluveco, muŝoj, varmego, urbanoj...kaj nigoj.

Mi ŝuldas grandan dankon al longa listo da ĉi-tieuloj kaj mi volonte akceptus korekton, se iu povus pruvi, ke mi prezentas netipan perspektivon. Iuj el miaj renkontatoj ja distingas inter "bonaj" kaj "malbonaj" nigruloj, sed ĝis nun mi ne aŭdis iun cedi, ke la tragedio de la ĵusaj du jarcentoj iel rilatas al la nuna situacio de la nigruloj.

La malvasteco de la horizontoj estas ĝenerala ĉe multaj. Jen kelkaj perloj, kiujn mi aŭdis lastatempe:

Pri eksterlandaj aferoj ĝenerale: Diru, homo, kial tiuj aliaj landoj vin interesas? Ĉu ni ne havas sufiĉe da problemoj en Aŭstralio?

Pri Kambodio: Kiu donas furzon pri tiuj ĉing-ĉongoj kaj vjetkongoj?

Pri Somalio: Jes, ili [= la aŭstralia registaro] sendas monon al ili, sed kio pri niaj bienistoj?

Pri Bosnio: Ili [= kiuj?] devus doni al ili ĉiuj pafilon kaj unu fojon por ĉiam decidi la aferon, sed mi ne volas, ke eĉ unu aŭstralia soldato iru tien.

Pri la landoj de la antaŭa SU: Kio okazas al ili estas merdegale, nur ke ili ne refoje iĝu ruĝaj [= komunismaj].

Same kiel mi povus aldoni multajn ekzemplojn de afableco kaj malavareco, mi povus aldoni ekzemplojn de mensa kramfo.

Kiam oni ĉiutage spertas la fidemon, honestecon kaj bonkorecon de ĉi tiuj loĝantoj de la aŭstralia interno, oni konscias, ke la vivo en niaj urbegoj estas misvojo. Sed kiam liberala malfermiteco de la kapo aldoniĝos al la korboneco de la vilaĝanoj?

Verkita en Barealdine 96.06.01.

❑



[1]Pli oficiale *ora perĉo.*

LA DROGSKLAVO
DE RALPH HARRY

Edmondo ridetis. Nun li estis tute kontenta. Li ĉirkaŭrigardis al la bela vilaĝeto, kie li ekloĝis tiun matenon. Ĝi estis komunumo por emeritoj, kun bele prizorgataj ĝardenoj kaj rojeto bordita de arboj, inter kiuj flugetis birdoj diverspeciaj. Tie kaj tie homoj promenadis, pare aŭ solece, sur la padoj kaj trans la lignaj pontoj. En la fono estis lageto, sur kiu naĝis sovaĝa anaso sekvata de kvar anasidoj. Edmondo ridetis. Ĉi tie li povos esti libera—libera de la drogo, kiu dum tiom da jaroj tenis lin sklavo. Ĉar ĉi tie neniu scias, ke li havis problemon. Al tiuj promenantaj samvilaĝanoj li, la antaŭa Edmondo Verdo, estos Eduardo Bruno, emerito, bona najbaro.

Li rememoris la tempon, kiam li, la unuan fojon, ekkomprenis, ke li havas problemon. Estis kiam lia edzino malsaniĝis, kaj li deziris pasigi pli da tempo kun ŝi, ĉar li vere amis sian karulinon, kvankam dum la antaŭaj dek jaroj li tre neglektis ŝin, kaj ofte estis for de la domo, penante satigi tiun narkotan deziregon, kiun li akiris unue kiel studento, kaj kiu, iom post iom lin sklavigis. Jes, subite li komprenis, ke li ne povas rompi la ĉenojn, kiuj ligis lin. Li ne povas refari sian vivmanieron, por fariĝi fidela, zorganta edzo. Li ne povas helpi ŝin en la domo, akompani ŝin en la ĝardeno kaj al la urbeto kaj pasigi longajn vesperojn legante al ŝi el la ĵurnalo aŭ gazetoj. Iu forta logo devigas lin foriri, por pasigi horojn kun siaj geamikoj, kun siaj sammaniuloj.

Li klopodis malgrandigi sian dependecon de tiaj eksterdomaj vizitoj. Li fiksis certan nombron da tagoj, kiam li restos hejme kaj rezistos ĉiujn invitojn viziti la klubon, aŭ ekskursi. Sed la kutimo estis tro forta. Ĉiam li malrezistis al la tento. Li fariĝis jam vera sklavo.

Li konsultis psikiatron, kaj klarigis al li siajn malfacilaĵojn. La psikiatro informis lin, ke li ja havas seriozan problemon. "Se rilatus al alkoholo", li diris, "Mi konsilus vin partopreni en grupo de t.n. alkoholismuloj anonimaj. Tia grupo helpus al vi fari decidon kaj ne cedi al la tento. Ĉiu en la grupo subtenus unu la alian. Kompreneble via problemo ne estas tute sama, sed eble vi povos trovi grupon, kie vi havos subtenadon. Ankaŭ mi konsilas al vi", li aldonis, "trovi hobion aŭ sporton, kiu diversigus vian vivmanieron, kaj helpus al vi fari aliajn dimensiojn en via vivo. Sed rilate narkotajn obsedojn, kvankam uzado de alternativaj drogoj kaj psikologiaj trukoj povas helpi, la ĉefa afero estas fari decidon, kaj sekvi ĝin kun la helpo de viaj parencoj kaj amikoj".

Edmondo rememoris siajn postajn klopodojn trovi komprenantajn amikojn, sed neniu pretis helpi. Aŭ oni konsideris lin perfidulo aŭ oni ne povis kredi, ke persono kun tiel forta karaktero vere havus problemon, aŭ oni kredis, ke pro la morto de sia dumviva partnero li freneziĝis. La klubon "Esperantistoj Anonimaj" li ne sukcesis fondi.

Tiam Edmondo legis pri Kazimir Bein. Kabe, la eminenta Esperantisto, kiu subite malaperis el la movado, sen

averto kaj sen klarigo. Evidente Kabe ankaŭ ekkomprenis, ke Esperanto estas narkoto, kaj decidis sin liberigi. Klare li havis fortegan volon, ĉar li sukcesis eskapi el la sklaviga povo de la internacia lingvo kaj la verda movado. Edmondo rememoris la vortojn de la psikiatro pri firma decidemo kaj, laŭ la modelo de Kabe, li tuj ĉesigis sian agadon kaj trancis ĉiujn kontaktojn kun siaj Esperantaj amikoj. Li nuligis aŭ ne renovigis kotizojn kaj abonojn. Li ĉesigis vizitojn al la societo de sia urbo. Li transdonis ĉiujn librojn kaj gazetojn al la urba biblioteko. Li donis siajn verdajn stelojn kaj kovertojn kun poŝtmarkoj al la genepoj. Tamen oni ankoraŭ telefonis al li. Preskaŭ ĉiun tagon li aŭdis la vorton "Esperanto" en kvizprogramo, aŭ trovis ĝin kiel indikon en krucvortenigmo. Kaj la domo mem, kie li ankoraŭ loĝadis post la morto de la edzino, memorigis lin pri tiuj stimulaj vesperoj, kiam la samideanoj venis por festi la datrevenon de Zamenhof, aŭ por gastigi iun vizitantan eksterlandanon. Iom post iom li rekomencis sian verdan revadon dum la tago, eĉ siajn verdajn sonĝojn dum la nokto. Denove li vizitadis la klubon kaj partoprenis en landaj kongresoj. Denove li abonis *Heroldon, Literaturan Foiron, Monaton* kaj la *Leteron de l'Akademio de Esperanto,* aniĝis al UEA, legis recenzojn, mendis librojn, registris sin por Universala Kongreso.

Tiam, kiam li preskaŭ akceptis la sorton resti fanatika Esperantisto ĝis la morto, Edmondo hazarde renkontis la psikiatron, kiun li konsultis antaŭ la morto de la edzino. "Mi pensis pri vi antaŭnelonge", diris la kuracisto, "kiam unu el miaj klientoj sukcesis ĉesigi la fumadon de cigaredoj. Mi diris al mi—"Tiel ankaŭ oni eble konkerus obsedan praktikadon de lingvo".

"Kion li faris?" demandis Edmondo, "Ĉu vi preskribis por li medikamenton?"

"Tute ne", respondis la psikiatro, "mi nur konsilis lin translokiĝi al alia urbo, kie li konos neniun, kaj praktiki novan hobion. Li translokiĝis al alia ŝtato kaj aĉetis personan komputilon. Li ĵus raportis, en bonega letero kompostita per la komputilo, ke jam dum tri monatoj li ne fumis eĉ unu cigaredon. Antaŭe li fumadis konstante, ĉirkaŭ 40 cigaredojn ĉiutage".

Edmondo estis iom skeptika. Li tiel ofte malsukcese penegis konkeri tiun kutimon ĉionpostulantan. "Kiel helpis lin la translokiĝo?" li demandis.

La psikiatro klarigis, ke se oni restas en la sama loko, kie oni uzadis drogojn, kiam oni anoncas, ke oni decidis ĉesigi la kutimon amikoj turmentetas kaj tentas al rekomenco. Oni diras rikane, ke oni aŭdis multfoje pri firma decido ĉesigi, sed ke neniam fanatika fumanto rompas la ĉenojn. Sed se oni iras al fora loko, kie neniu scias pri la pasinteco, kaj se oni rifuzas proponitan cigaredon per la vortoj: "Mi ne estas fumanto", la homoj onin kredas, kaj poste ne proponas tabakon. Se oni povas eskapi el situacioj de socia premo, kaj se oni plene uzas la tempon per nova interesa okupo, tiam oni povas gajni en la batalo kontraŭ nikotino. "Kaj mi opinias," diris la psikiatro, "ke tiu metodo povus sukcesi ankaŭ en via kazo."

Edmondo decidis fari unu finan klopodon eliĝi el la marĉo, kie li baraktadis, por povi pasigi siajn lastajn jarojn trankvile kaj elegante, eble verkante siajn memoraĵojn en sia patrina lingvo. Li studis anoncojn kaj reklamojn pri "vilaĝoj" por emeritoj

en aliaj ŝtatoj. Kompreneble li ne povis peti konsilon aŭ informaĵon de samideanoj, ĉar esenca parto de la plano estus ne riveli al la Esperantistoj de la elektota urbo, ke li translokiĝos tien. Tamen li trovis, sen tro da peno, la vilaĝon, kie li nun loĝas, lokon, kiun li taksis sufiĉe malproksima de la loĝlokoj de membroj de la landa asocio, kies adresojn li kontrolis en la jarlibro. Do, li vendis sian domon, kun ĝiaj ĉambroj ankoraŭ plenaj de zamenhofaj voĉoj, kaj en kies ĝardeno ĉiu arbo, arbusto kaj plurjara planto havis etikedeton kun la latina kaj esperanta nomoj. Spite al la konsilo de la funkciulo en la poŝtoficejo li ne registris sian novan adreson.

Li eltiris la monon el siaj bankkontoj per ĉekoj, kiujn li povos deponi en novan konton ne ligotan al la antaŭurbo, kie li loĝos, Li laŭjure registris novan nomon—Eduardo Bruno. Por fina protekto li akiris telefonon kun numero, kiu ne aperos en la ĉiujara telefonlibro. Tiel efektive Edmondo Verdo malaperos sen spuro.

<<<<<>>>>>

Edmondo, nun Eduardo, eniris la domon, rigardante la elegante meblitan salonon, la komfortan dormĉambron, kaj la kabineton kie situis liaj novaj ludiloj—komputilo, amika al uzantoj, kaj laserpresilo. Per tiuj li povos verki siajn memoraĵojn en formo, kiun neniu eldonisto povos rifuzi.

La sola persono, al kiu li estis konfidinta sian sekreton, estis lia filino Maria, kiu loĝis en tiu sama urbo kun sia familio. Ŝi multe helpis pri la aĉeto de mebloj, pri maŝinoj por la kuirejo, pri koloroj de kurtenoj kaj tapiŝoj. Maria ankaŭ estis spertulo pri komputiloj kaj kuraĝigis lin, kiam li informis ŝin, ke en la nova domo li nepre devos havi sian propran aparaton. Kiam li alvenis, ŝi bonvenigis lin, prezentis la plene meblitan ĉambraron kaj la uzpretan komputilon. Ŝi donacis al li pakaĵeton kun mola disko kaj broŝuro pri vortprogramo "Superfranca", kiun ŝi jam enmetis en la malmolan diskon de la komputilo. "Se vi malfidas al la poŝtistoj", ŝi diris, "vi povos skribis al mi en la franca".

Edmondo ŝaltis la aparaton. La ekrano lumiĝis kaj ridetanta vizaĝeto bonvenigis lin. Aperis la menuo. Li elektis vortprogramon kaj la superfrancan literaron. Estos amuze skribi leteron france. Li komencis tajpi laŭ la sistemo ĵus lernita: Chère Marie et Jean, vous êtes... Tiam impulse li provis, ĉu la cirkumflekso funkcias super la *s*. Li tajpis ŝ, tiam ĵ, kaj ĝ, kaj ĉ... tiam la majusklojn: Ĉ, Ĝ, Ĵ kaj Ŝ. Fascinate li tajpadis: La ĉenoj ĵus ŝanĝiĝis al flugiloj. Ĉirkau... li serĉis vane sur la klavaro brevon[1]...sed eble estas io en la broŝuro kun la disketo. Li legis: "La programo *Superfranca* egale ebligas kompostadon en la germana, hispana kaj esperanta lingvoj". Estis bildo de la alternativaj elekteblaj literoj kaj supersignoj. Ĝi indikis, ke premo de la elektoklavo kun la u-klavo registros brevon. Edmondo ne povis rezisti. Li tajpis: "ĉirkaŭ la domo estas eŭkaliptoj aŭ:..." Tiam en lian menson venis alloga ideo. Jen bona temo por novelo, kiun eble akceptus gazeto. Li komencis:

LA DROGSKLAVO

Edmondo ridetis. Nun li estis tute kontenta. Li ĉirkaŭrigardis al la bela vilaĝeto, kie li ekloĝis tiun matenon...

[1] *Brevo* Montague C. Butler, *Esperanto-English Dictionary* (tipografio): la supersigno -ueto- kiu el la litero u faras la literon ŭ.

KIU DIRIS TION?



DE RALPH HARRY

Citaĵkvizo numero 10

Multaj eminentuloj parolis pri la laboro. Penu parigi la personon kun la citaĵo. La solvo aperas sur paĝo 27.

(a) Robert Louis Stevenson
(b) Voltaire
(c) Zamenhof
(ĉ) Sacha Guitry
(d) Francis Bacon
(e) Thomas Dekker
(f) Sankta Biblio — Sentencoj
(g) Robert Burns
(ĝ) Oliver Goldsmith
(h) Charles Kingsley
(ĥ) Jerome K. Jerome
(i) Benjamin King
(j) Charles Lamb
(ĵ) Thomas Carlyle

1. Ni laboras frue, ni laboras malfrue
   Por nutri friponan moŝton, amiko.
2. ...Post longa laboro
   Ĉu mi venkos en decida horo?
3. La laboro forigas de ni tri grandajn malbonojn: la enuon, la malvirton kaj la mizeron.
4. Honesta laboro portas belegan vizaĝon.
5. La laboro estas la granda kuracilo de ĉiuj malsanoj kaj mizeroj, kiuj iam sieĝis la homaron.
6. Nenio ol laboro farebla
   Nenio ol nutraĵo manĝebla.
7. De ĉiu laboro estos profito: sed de babilado venas nur senhaveco.
8. Faru proksiman laboron,
   Kvankam enuas iame
   Helpante super murŝtupojn
   Hundon irantan lame.
9. Labori sen deziri labori ne estas laboro sed servuto.
10. Vojaĝi esperante estas pli bona afero ol alveni kaj la vera sukceso estas labori.
11. Infanoj dolĉigas laboradon sed ili faras malfeliĉon pli amara.
12. Feliĉa tiu, post juneclabor',
    Kiu maljunas kun kontent' en kor'.
13. Mi estimas laboron: Ĝi fascinas min. Mi povas sidi kaj ĝin rigardi dum pluraj horoj.
14. Kiu, la unua, inventis la laboron kaj ligis la liberan spiriton, kiu ĝojas pri ferioj.

LINGVA ANGULO

de ALAN TOWSEY

Jen pluaj vortoj kaj esprimoj misuzitaj en diversaj publikaĵoj, kiujn mi vidis dum mia legado:

1. *Mi interesas pri... Devas esti: Mi interesiĝas pri/Min interesas (la angla literaturo).
2. *Li petis demandon. "To ask a question" estas "fari/meti/direkti demandon."

   Peti = to request: do, "Mi petas" = Please.

   Li petis min legi/ke mi legu la leteron.

   Peti helpon, permeson, pardonon.
3. *vaga konturo (vague outline). Vagi = to wander. Do: vaga vivo = wandering (way of) life. Vague = svaga.
4. *kooperacii (to co-operate). Devas esti: partopreni *aŭ* kunagi; kunlabori (= to collaborate). There is also a verb: kooperi, but this is only used in a commercial sense, e.g., as a member of a co-operative society—never in the ordinary sense of English "co-operate". (My thanks to our learned editor for drawing my attention to this restricted use—I, too, live and learn!
5. *lia mala numero (his opposite number). Devas esti: lia homologulo/samrangulo/ekvivalento.
6. *kovroj (covers). Devas esti: kovriloj. Kelkfoje "cover" estas "kovraĵo"; ekz. kovraĵo el pajlo, plumbo.

TAKE

If you ask the average Esperantist how to translate "take", almost certainly the first word that comes to mind is "preni". But, of course, there are many other meanings besides simply "take hold of, pick up". Some of these (more idiomatic) meanings can, fortunately, also be rendered by "preni" in Esperanto:

Li prenis ŝiajn vortojn al si en la koro (= took to heart).

Mi neniam prenas kun mi multon da pakaĵo.[Z]

Li prenis min kun si en tiun laŭbon.[Z]

Li volonte prenis tiun taskon sur sin.

NB: preni ion disde iu (take something from/off somebody)

preni urbon (= kapti)

preni kiel atestanton (take as a witness)

WINDOW ON THE WORLD

Scholarship for new Esperantists: The Mueller-Sorau Scholarship is awarded by the NSW Esperanto Federation to new Esperantists who have been studying Esperanto for up to three years. Interested applicants should contact the Examinations secretary of AEA (Marj Ellyard, 5 Ridgecrest Village, Burkitt St, Page ACT 2614) to apply for the Elementary Exam in early August. Candidates must also submit a 500 word essay on the topic "Tio, kio allogis min al Esperanto" by the end of October to the Board of the NSW Esperanto Federation. There are two alternative prizes, awarded in November: a trip to an AEA Congress (January 1994 or 1995) or a cash grant of $500 plus books to the value of $250. Full details from Brian Currie, 51 Harris Road, Normanhurst NSW 2076.

Esperanto University founded: The International Academy of Sciences San Marino (AIS) held its first teaching sessions in early June this year, in Maribor, Slovenia, to be followed by a second round in San Marino itself in August-September. The AIS is accredited as a university in Germany and Italy. It offers a Bachelor's degree, Master's degree, Phd, and D.Sc. Teaching is entirely in Esperanto. [From *Eventoj* April(2) & May(2) 1993.]

In **Cuba a conference on Esperanto and tourism** is to be held in Havana Sept. 12-19, 1993. Accommodation is available by prior arrangement at the Cuban Esperanto-Association's headquarters in Havana.

Bruno Dalla Pozza, an Esperantist from Saipan in the Mariana Islands (a dependency of the USA), won three gold medals in the international judo championships held at the Superdrome in Perth this autumn.

Chinese Science: A quarterly international journal of popular science has begun publication in Esperanto, *Tutmondaj Sciencoj kaj Teknikoj* ("World Wide Science and Technology"), published under the auspices of the Chinese Academy of Sciences. Subscriptions to the new journal cost US$12 (≈ AUD$18, NZ$23). ✉ 52, Sanlihe, CN-100864 Beijing, China. [From *Eventoj* May(1), 1993.]

Chicago Mayor Richard M. Daley at the start of International Friendship Week (Feb. 21-27, 1993) included in his speech the recommendation "I urge the citizens of Chicago and of the world to recognize and accept Esperanto as the world-wide second language." [From *Eventoj* May(1), 1993.]

"Green oases" in bloom. A few years ago the beginnings of a new development in Esperanto appeared: the creation of ecological homes, communities, and villages, in which Esperanto plays a central role. The pioneer project was the French "Mondhejmo" (world home); it was followed by the American "Esperanto Oasis". Now in mid 1993 three new projects have been announced. At Hannezel, a town set among green hills in eastern France, an ecological association had its start in 1989. Now it has be-

come an International Ecological Centre, relying on natural sources for heating, recycled water, and permaculture. Again in France, the hamlet of Collobrières is the scene of a four week Esperantist project in July and August to clean up the local river. And in Ireland, an old twenty hectare farm in Bloomville is being turned into a country conference centre for Esperantists, ecologists, vegetarians, and others. Recently a "peace forest" of 8 000 trees was planted on the farm. Back again in France, a new periodical *Hejmoj* ("Homes") has begun publication as a forum for persons interested in the creation of international Esperanto communities. [From *Monda Forumo* .]

ESPERANTO IN EDUCATION

FROM ISOLATION TO GLOBALISM...ESPERANTO AT CARVER MIDDLE SCHOOL

by Naomi R. Kilpatrick & Adrienne LeDree

[Naomi Kilpatrick is Principal of Carver Middle School in Chicago; Adrienne LeDree is an award-winning teacher and the coordinator of Esperanto activities at the school.]

The Students

The Trainable Mentally Handicapped class was the first class that participated in the Esperanto Instruction at Carver Middle School. It consisted of ten students. After three weeks a second class of regular education students had to be added. Esperanto for the T.M.H. class was never taught at a fixed time interval. It was integrated along with sign language, throughout the day with their other subjects. The regular education students began coming in the morning from 8:15-9:30 a.m., and again in the afternoon from 2:30-3:30 p.m. When the Social Centre Program began, the group became a part of it. The students decided to name themselves "The International Esperanto Club."

The Results

The students practiced reciting their numbers, alphabets and colours from charts. They really enjoyed playing "Numbers Bingo" where the numbers were called in Esperanto. Esperanto Dominoes was another game that enhanced their vocabularies and gave them the confidence to begin making sentences. Another favourite game was describing each others' attire. Students learned to sign bilingually using Esperanto and Sign Language. They read and translated many letters, but had to seek the assistance of others in translating some of their correspondence. The class received instructional lessons from students in China and Poland which they completed and returned.

Two general letters were devised and sent to their pen pals along with photographs of the students.

There was no difference in the way the students learned Esperanto. The Special Education students learned it with the same ease that the gifted students experienced. This was especially significant considering that Sign Language was being taught simultaneously.

The program is designed to make the children tri-lingual. Another significant finding was this...The Behaviour Disordered students were marvellous. They posed no problems as far as discipline is concerned. Their love of the language helped with attention deficit disorders.

The students performed for the Local School Council, signing and conversing bilingually. The class celebrated the Esperanto "International Friendship Week" by preparing food from fifteen countries. They took two days to shop for the ingredients and three days to prepare the menu. The celebration ended in a feast. Approximately thirty-five people attended including the president of the Chicago Esperanto Society and the head of the Foreign Language Department for the Chicago Board of Education. The children have been mentioned in various newspapers and magazines, both here and abroad. They will be featured on the television show "Someone You Should Know" with Harry Porterfield. One of the students performed at the Delores Kohn International Teaching Awards ceremony, speaking in Esperanto.

Our class has entertained guests from Japan, Hungary (Budapest), Bulgaria and Poland (Warsaw). Some of our visitors sat in on a Local School Council meeting and became house guests of the instructor so they could get to know the children better.

The children have completed three scrapbooks of cards, letters and photographs from people all over the world. Approximately thirty-three countries are represented. They also have completed a video of themselves that will be distributed to other Esperanto classes.

Our school is located in an impoverished, isolated community and few of our students will ever get the chance to travel around the world, but through the magic of Esperanto the world has come to us!

Future

We intend to continue the Esperanto classes here at Carver Middle School. The students have learned more about geography and the cultures of our "Extended World Family" than we could ever have learned from any textbooks.

It is our sincere desire that our students be motivated to continue learning different languages in an attempt to promote World Peace and Understanding. We are very proud of the efforts of our students and the insights they have gained. Esperanto will continue to be a vital part of our curriculum. We strongly encourage other schools to embrace this beautiful language.

[Reprinted from *esperanto/usa* 1992(6)]

THE VALUE OF ESPERANTO AS A PREPARATION FOR LANGUAGE LEARNING

Experiment in Italian elementary and postelementary schools (Scuola elementare Rocca and Scuola Media Statale, San Salvatore di Cogorno). Years: 1983-1984 and 1984-1985; 1985-1988.

Two parallel classes in the fourth and fifth years of the elementary school; in one Esperanto was taught, in the other not. In the post elementary school, all boys and girls began learning French, both those who had preparation in Esperanto and those who had not received such preparation.

Aims: to provide quickly a useful means of communication for instant use in transnational relations (correspondence and meetings); to make available a simple and regular model of comparison for more effective teaching of the home tongue; to prepare a practical basis for the future learning of foreign languages; to enrich the learning and educational program through the use of Esperanto for the other study subjects.

Conclusions: After the study of Esperanto: According to the final checks, the speaking capacity of the children was noticeably better: they conversed spontaneously on different themes; their pronunciation was correct; grammatical or lexicon errors sometimes obtruded, but never prevented mutual understanding. After the three years of French instruction: "The ex-pupils of the experimental classes in Esperanto of the Rocca Elementary School produced a total of 60 correct solutions out of 100, while their classmates in the high school, who had not had an analogous preparation, achieved only 49%."

International Pedagogic didactic experiment, 2nd region. 1975-1977.

Organised by ILEI; participants 16 pupils from Belgium, 45 from France, 90 from Greece, 77 from Germany (Fed. Rep), and 74 from The Netherlands. A common final week in St. Gerard, Belgium, in 1977: teaching in Esperanto on mathematics, geography, drawing, sport, music and Esperanto.

Aims: to demonstrate the better learning effectiveness and economy, compared with the teaching of other foreign languages; to study the influence of Esperanto on better learning of the mother tongue; to investigate the acceleration of development in reading capacity and spelling of children, particularly those having learning problems in these fields; to develop language comprehension to such a degree that the children will be able more easily to learn other foreign languages; to contribute to the European education of the children and to humanistic internationalism.

Conclusions: opinion of the non-Esperantist Belgian Inspector General Andrianne: "Esperanto is the most suitable language as a basis for those who intend to learn other foreign languages." Progress was noted in the direction of full internationalisation; moreover, Esperanto was clearly a suitable instrument of common understanding, and an excellent means of communication for the teaching faculties.

[From Document 28-29E published by UEA, Rotterdam, 1993. Tr. Dr Ralph Harry]

preni kafon/bieron/tagmanĝon/banon/konsilon. Mi ĉiam prenas mian teon forta.[z] (Actually, Zamenhof wrote: Mian teon mi prenas ĉiam forta.)

preni freŝan aeron (take a breath of fresh air)

Mi prenas la liberecon diri al vi ke...

preni subaĉeton (take a bribe/kickback)

Neniu prenas lin serioze.

Ĉu vi prenas min por stultulo?

Wells's Dictionary gives the following additional translations (examples mine):

akompani, konduki. Oni kondukis lin en grandan ĉambron.

kapti, venkopreni. Ili kaptis/venkoprenis la urbon.

ricevi. Ricevi (ian) formon (take shape).

postuli. Tiu laboro postulas multe da tempo. Kiom da tempo tio postulos?

sukcesi. Tiu teorio neniam sukcesis.

take after (= resemble): simili al.

take in: ricevi (gastojn); kompreni. Li ne povis tuj kompreni, kion oni diris al li; trompi. Oni facile trompas lin. (He's easily taken in).

take off: forpreni (ion de sur la tablo); demeti. Li demetis la ĉapelon, siajn vestaĵojn. NB: demeti ovon = lay an egg! ekflugi. La aviadilo ekflugis.

take on: entrepreni (= undertake). Ŝi entreprenis la tradukon; akcepti. Mi akceptis la respondecon (I took on the responsibility).

take out: eligi. Li eligis sian revolveron; forpreni (= take away); akompani, eskorti. Li eskortis sian amikinon al la kinejo; kontrakti (= take out a contract).

take over: transpreni. Mi transprenis la taskon. take-over: kompaniaĉeto. (Also: kaptaĉeto.)

take to: ekŝati. Mi tuj ekŝatis ŝin (I took to her at once). (Also: Ŝi tuj ekplaĉis al mi); sin doni al. Li donis sin al la laboro kun granda entuziasmo.

Take up: preni, levi. Li prenis sian skribilon (He took up his pen); okupi. La tablo okupas tro da speco; akcepti. Mi akceptos vian afablan inviton. Ili akceptis la defion (challenge). NB: akcepti kiel fakton (take for granted).

And these are just a few! Here are some more (with acknowledgment to Woolf's *English Phrases and Expressions in Esperanto*—a valuable, almost indispensable, little book, as is also its *Aldono*).

take apart/down: dispecigi, malmunti; take down, noti. Mi notis ĉion, kion li diris, en mia notlibro; trompi. La fraŭdisto trompis lin je 100 dolaroj (The

con man took him down to the tune of $100).

taken aback: konsternita (pro).

take care of: prizorgi, flegi.

take it: elteni. Mi ne povas plu elteni (I can't take it any more).

Take it easy! Trankviliĝu! Ne rapidu. Vi devas lerni ne tiom urĝi vin (You must learn to take it easy).

Take it from me: Kredu min.

take it out on: li venĝis sin kontraŭ mi.

I take it that... Mi supozas/komprenas ke...

(quite) taken with: Mi estis (tute) ĉarmita de la bildo.

take off: mimiki, karikaturi, burleski; subtrahi (subtract); rabati (rebate, discount).

take on: dungi (hire). Li dungis tri pluajn laboristojn; preni sur sin. Ŝi prenis sur sin tiun malfacilan taskon; Don't take on so! Ne tiom emociiĝu/ekscitiĝu!

take out (e.g. a stain): forigi; (a licence etc.): havigi al si (permesilon); (a girl): amindumi (= woo); elpreni (denton).

take to: riproĉi. Tuj kiam mi revenis, li riproĉis min.

take unawares: surprizi, trafi neatendite.

take up: Mi ne volas foruzi tro de via tempo. (**Not** *da*!—see *TAE* Jan-Feb 1992). Mi ĵus komencis ludi tenison (I've just taken up tennis).

take up with: kunuliĝi kun.

Don't take it/me the wrong way! Ne miskomprenu min! Ne ofendiĝu (pro tio).

And there are many more! But don't take fright, or blame it on that so-called simple or easy Esperanto—you will have the same problem whenever you try to translate "take" (or any other idiomatically used word) into *any* foreign language; believe me, I know! ❑

PASPORTA SERVO 1993

Pasporta Servo estas servo de la Esperanto-movado por Esperanto-parolantoj. Ĉiuj membroj havas la eblecon ricevi senpagan gastigadon. Ĉiu kiu posedas propran ekzempleron de la listo de gastigantoj estas membro kaj rajtas uzi sian liston por trovi gastiĝon. La listo estas persona. Oni ne rajtas prunti sian liston al alia persono. Por ke la listo validu ĝi devas havi la nomon de la posedanto sur la kovrilo. Gastigado de Pasporta Servo ne nepre estas luksa. Ĉiuj variantoj ekzistas, de surplanka dormado en propra dormsako ĝis rajto je utiligo de la tuta domo.

Por aliĝi aŭ por pliaj detaloj, kontaktu: Pasporta Servo de TEJO p/a Rob Keetlaer, Postbus 2310, NL-1000 CH Amsterdam, Nederlando.

LA SIGNIFO KAJ UZO DE LA VORTO "VAKERO"

DE BERNARD GOLDEN

En n° 286 de *The Australian Esperantist* (julio-aŭgusto 1991 p. 19-22), mia artikolo "Pravigo de la termino 'lanĉetilo' anstataŭ 'vumero'" montras, kial 'vumero', registrita en *Aŭstralia-Esperanta Vortaro,* ne estas utila aldono al la leksiko de Esperanto. Mi argumentas, ke la nocio estas pli konvene esprimebla, ne per aborigen-devena vorto, sed per la travidebla kunmetaĵo "lanĉetilo", konsistanta el du radikoj jam de longe ekzistantaj en Esperanto. En la nuna studaĵo mi aplikos la saman analizmetodon al "vakero", kiu en la citita vortaro estas uzata por traduki la anglan vorton **stockman**. Ĝi aperas ankaŭ en la kunmetaĵo "vakerĉevalo", la Esperanta ekvivalento de **stockhorse**. Ekzameno de aliaj registraĵoj kun la vorto **stock** evidentigas, ke la leksikografia traktado ne estas konsekvenca.

stock route—vojo por bovpelado
stockwhip—brutvipo
stockyard—brutenfermejo

En tiuj ĉi terminoj A. **stock** estas esprimita en Esperanto jen per "bovo", jen per "bruto". Kial, do, ne estis uzataj la samaj radikoj por formi la Esperantajn ekvivalentojn de **stockman** (bovisto, brutisto) kaj **stockhorse** (bovist-ĉevalo, brutist-ĉevalo)? Kiel estas pravigebla la enkonduko de la "fremda" vorto "vakero"?

Pli frue publikigitaj Esperanto-vortaroj donas konvinkan precedenton por la uzo de la radikoj "bov-" kaj "brut-", ambaŭ Fundamentaj. Sub la kapvorto "bruto" *Plena Ilustrita Vortaro* (*PIV*) registras la sufiksitan formon "brutisto" kun la signifo "gardisto de brutoj", kaj ĉe bovo, la vorto "bovisto" estas difinita kiel "tiu, kiu prizorgas la bovojn". Plua trakribrado de *PIV* indikas, ke ankaŭ ĉe la verbo "paŝti" troviĝas sinonimo de "brutogardisto"; ĝi estas "paŝtisto", do estas eble aldoni ankoraŭ unu Fundamentan radikon al la unuaj du, kaj nia vorttrezoro nun inkludas "bovisto", "brutisto", "paŝtisto", "brutgardisto" kaj ankaŭ "brutzorgisto" por esprimi **stockman**; sekve, lia rajdbesto estas "paŝtista ĉevalo", "brutgardista ĉevalo" aŭ "brutzorgista ĉevalo".

Ankaŭ en Hungario ekzistas homoj laborantaj same kiel la aŭstralia **stockman**. En la hungara-Esperanta vortaro kompilita de Alfonz Pechan, la hungara vorto **gulyás** estas tradukita per "bovisto" kaj "brutaristo". La sammetiisto en hispane parolantaj landoj nomiĝas **vaquero**, kiun E. Tudela flores (1966) kaj J. Paluzie-Borrell (1967) en siaj hispanaj-Esperantaj vortaroj tradukas per "bovisto".

Taŭ rogardisto

Ĝis nun ĉiuj esprimoj estas formitaj per Fundamentaj radikoj, pluformitaj per la sufikso "-ist" aŭ kunmetitaj kun la radiko "gard-" aŭ "zorg-". Ŝajnas, ke tiu simpla maniero de vortformado ne kontentigis kelkajn esperantistojn, do ili komencis enkonduki neologismojn, supozeble kun la celo atingi pli da precizeco en la lingvouzo. La unua

estas "taŭro", "bovoviro" en *Plena Vortaro* (*PV*, 1934) kaj "bovo", "virbovo" en *PIV* (1970). Tiu ĉi vortaro registras en la artikolo pri "gardi" la kunmetaĵon "taŭrogardisto" kun la signifo "rajdanta laboristo, kiu gardadas taŭrojn"; sub la kapvorto "taŭro" li estas "rajdanta gardisto de taŭroj en kamparo". Rimarku, ke "taŭro" signifas nur "bovo", do ĝi ne estas sinonimo de "bruto", kiu povas esti bovo, ĉevalo, porko aŭ ŝafo. Novaĵo en la difinoj de "taŭrogardisto" estas la nocio, ke li estas rajdanto. Ĉe la fino de la difino en *PIV* estas resendo al "vakero" kaj "gaŭĉo".

Vakero

"Vakero" estas registrita jam en la *Suplemento* de *PV* (1953) kun la signifo "rajdanta gardisto de brutoj en Norda Ameriko". Etimologie "vakero" venas de la hispana **vaquero**, formita surbaze de la substantivo **vaca** "bovino" kaj la agant-sufikso **-ero**. La primara signifo de tiu ĉi polisemia vorto estas "paŝtisto de bovbrutaro".

Gaŭĉo

Ankaŭ "gaŭĉo" aperas la unuan fojon en la *Suplemento* de *PV*, difinita kiel "ano de miksita, eŭropan-indiana raso de Sud-Ameriko, kies metio estas ordinare rajde gardi la brutojn". Do, ankaŭ li laboras rajdante, ĉi-foje en Sudameriko. Cetere, informo estas aldonita pri la rasa aparteneco de la gaŭĉo. (En la "Prezento" de la eposo pri la gaŭĉo Martín fierro, esperantigita de Ernesto Sonnenfeld, estas skribite, ke laŭ alia teorio la gaŭĉo devenas sole de la blanka raso.)

Kiom da vortoj estas bezonataj?

Leviĝas tikla demando. Se verdaj leksikografoj akceptas apartajn terminojn por brutgardistoj el Nord- kaj Sudameriko, nome "vakero" kaj "gaŭĉo" respektive, kial ili ne alprenas ankaŭ la hungardevenan neologismon "guljaŝo"? Ĉiuokaze, la vakero kaj la gaŭĉo estas proksimaj parencoj, ĉar ili ambaŭ rajdante gardas brutojn en Ameriko. Sekve, ne estas eble apliki iliajn nomojn al sammetiistoj sur fremdaj paŝtejoj, ekzemple en la fora Aŭstralio.

Ankoraŭ unu objeto kontraŭ "vakero" estas ĝia manko de internacieco. La hispana formo **vaquero** estas pruntvorto en la usonangla lingvo, kie ĝi estas sinonimo de **cowboy** "kaŭbojo", sed la solaj aliaj lingvoj kun similaj vortoj estas la portugala (**vaqueiro**) kaj la itala (**vaccaio/vaccaro**). Se aŭtoro sentas, ke en verko pri brutgardistoj de Nord- kaj Sud-Ameriko, Hungario aŭ Aŭstralio estas bezonata la tiea nomo de la koncerna metiisto, li povas uzi la etnolingvan vorton kaj interkrampe aŭ piednote glosi ĝin, indikante la proksimuman prononcon per la Esperanta alfabeto.

Kaŭbojo

Estis menciite ĉi-supre, ke "kaŭbojo" estas sinonimo de "vakero". Ĉar tiu neologismo estis ekuzita en Esperanto antaŭ almenaŭ tri jardekoj, ĝi meritas apartan artikolon kun detaloj pri la kultur-historia fono. ❑





LATINAJ CITAĴOJ EN ESPERANTO
APARTE EN TRAKTATOJ KAJ ALIAJ JURAJ TEKSTOJ
DE RALPH HARRY

La Plej Alta Kortumo de Aŭstralio ĵus decidis demandon pri *terra nullius* ("nenies tero") rilate la posedon de tero fare de aŭstraliaj aborigenoj.

Kiam mi sendis al Juĝisto Kep Enderby artikolon kiun mi verkis por ***Monato*** pri tiu proceso, li menciis, ke li intencas, en fina juĝdecido antaŭ ol emeritiĝi, citi principojn en Esperanto kune kun la kutima latina.

La decido en la kazo *Gene Lobel & Photo Art & Sound (Cremorne) Pty. Ltd. -v- Alexander MacInstosh* aperis la 22an de junio [1992], dokumento de 151 paĝoj. Kiel kutime ĝi estas spicita per latinaj vortoj kaj vortgrupoj. La titolo komenciĝas: ***Coram:* Enderby J.** Sur paĝo 20 estas menciita "estoppel in pais" kun la esperanta klarigo "(konduta pledobaro)". Je paĝo 67 aperas "in bad faith" (malbonfide)". Sur paĝo 87 estas "(*sic*)", sur paĝo 93 "(*supra*)" kaj sur paĝo 101 "(*ab initio*)" sen klarigo. Sur paĝo 103 ni trovas *habere facias possessionem* ankaŭ sen klarigo. Sed sur paĝo 108 la juĝisto mencias la maksimon "equity will not suffer a wrong to be without a remedy" kun la klarigo (la ekvito ne permesas ke manku rimedo). Sur paĝo 117 estas citita juĝo de Juĝisto Mason, kiu uzas *prima facie*, kaj sur paĝo 122 troviĝas *per se*.

fine, sur paĝo 123 estas la frazo:

> "Mr. MacIntosh may not have known of the Latin expression *'nullus commodum capere potest de injuria sua propria'* although he would have been familiar with the English 'no man should take advantage of his own wrong' (neniu devu profiti el sia propra kulpo)."

Tio pensigis min pri la persista travivo de la latina lingvo en la internacia juro same kiel en botaniko (en la ***Aŭstralia-Esperanta Vortaro*** al ĉiu planto estas donata ĝia latina nomo), medicino (la ĉina, latina, esperanta, franca vortaro), antropologio (*homo sapiens*) kaj en la eklezio (*pater noster, ave Maria, peccavi* ktp).

Ŝajnis al mi ke oni devas evoluigi konsekvencan praktikon por la kazo kiam oni uzas internacie konatan esprimon en juĝa decido aŭ akademia artikolo *en Esperanto*.

Mi rememoris, ke en la traduko de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj kaj aliaj traktatoj mi kutime ne tradukis latinajn frazojn, kiuj estis en la originala latina en la oficialaj tekstoj. Mi decidis enketi, por vidi ĉu Lapenna tion faris, kaj ĉu mi konsekvence agis.

Troviĝas en ***Nova Fundamenta Krestomatio*** artikolo de Ivo Lapenna (p.289): "Kelkaj aspektoj de la latina problemo en internacia publika juro kaj kompara juro". Lapenna diris, ke, inter la principoj, kiujn li aplikas estas: (c) konservi la latinajn esprimojn kaj maksimojn, kiuj estas jam firme establitaj. Tamen, en tiu artikolo, Lapenna tradukis aŭ klarigas kelkajn fakajn terminojn el la listo de

Schwarzenberger II p.677:

Accessio cedit principali: akcesora aĵo, se aneksita al ĉefa aĵo, fariĝas parto de la ĉefa aĵo.
Actio personalis moritur cum persona: persona akuzrajto mortas kun la persono.
Ad hoc: por aparta celo.

laŭ mia memoro, estas kelkaj latinaj frazeroj en la Ĉarto de Unuiĝintoj, kiujn ni ne tradukis.

En la Statuto de la Internacia Kortumo troviĝas:

Art. 38: Ĉi tiu regulo ne limigas la povon de la kortumo prijuĝi *ex aequo et bono* se la partioj pri tio konsentas.

En la Konvencio de Vieno pri Diplomatiaj Rajtoj (1961) troviĝas:

Art. 9: *persona non grata* (persono ne akceptata de ŝtato kiel taŭga reprezentanto de alia ŝtato)
Art. 27(6): *ad hoc*

En la Konvencio de Vieno pri la Juro de Traktatoj (1968) troviĝas:

Antaŭparolo: *pacta sunt servanda* (interkonsentoj estas plenumendaj)
Artikolo 10: *ad referendum* (kondiĉe ke la registaro aprobas)
Artikolo 21: *inter se* (inter si)

En Rezolucio 2749 (XXV) de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj (Deklaracio pri la principoj regantaj la maran fundon kaj la oceano-fundon, kaj ilian subgrundon ekster la limoj de naciaj jurisdikcioj) troviĝas:

Artikoloj 9 kaj 11: *inter alia (inter aliaj aferoj)*

En siaj ***Juraj Terminologiaj Problemoj, IEAJ, 1987*** Lapenna diris (p.33):

Krome, en verkoj pri internacia juro kaj en tiuj rilatantaj al la romiisma familio, grandparte ankaŭ al la komunjura kaj sovetiisma, oni povas sukcese utiligi ankaŭ latinajn maksimojn, eventuale kun Esperantaj tradukoj aŭ eksplikoj. Ekzemple:
ad hoc: por aparta aŭ speciala celo
Accessio cedit principali: akcesora aĵo, se aligita al ĉefa aĵo, fariĝas parto de la ĉefa (masto fariĝas parto de ŝipo).
Audiatur et altera pars: estu aŭdita ankaŭ la alia flanko; pli strikte: neniu estu kondamnita antaŭ ol oni donis al li la eblecon aŭdigi siajn eksplikojn kaj argumentojn.
Ex aequo et bono: solvo de disputo laŭ principo de aktuala justeco, malatentante, se necese la preskribojn de pozitiva juro.
Nullum crimen sine lege: nenia krimo sen leĝo, t.e. se jam ekzistanta leĝo ne difinas iun agon aŭ neagon kiel kriman.
Res judicata: decidita, pri juĝita afero, kiun oni ne rajtas reiniciati antaŭ kiu ajn juĝa instanco.
Res nullus: nenies aĵo, t.e. aĵo super kiu neniu havas ian ajn rajton.
Ultra vires: ekster laŭjura povo aŭ ekster jurisdikcio.
Intra vires: enkadre de rajto aŭ jurisdikcio.

Latinaj vortgrupoj jam esperantigitaj

Kelkaj latinaj vortgrupoj estas jam esperantigitaj, ekzemple:

ante meridionem (a.m.) matene, antaŭtagmeze

bona fide: bonafide ("Agante kun honesta sincereco, sen intenco trompi" [*PIV*]; bonfida, bonfide, bonfido [Jackson])
bona fides: fidindeco
et cetera: kaj tiel plu
et aliaj: kaj aliaj
ex officio: proofica
mens rea: dolo
post meridionem (p.m.): posttagmeze
post mortem: postmorta (nekropsio)
prima facie: unuavide
re: pri
via: tra

Latinaj vortgrupoj uzataj en la angla, kiujn oni eble devus esperantigi

Estas multaj aliaj vortgrupoj latinaj, kiujn oni kutime uzas en la angla kaj kiuj estas supozeble universalaj. Kelkajn mi trovis en la vortaro de Wells, kelkaj estas en la terminaro de Ian Jackson pri angla juro. La aliajn mi mem tradukis. Mi bonvenigus sugestojn por korektoj aŭ aldonoj:

ad infinitum: senlime, por ĉiam
ad interim: provizora, provizore
ab initio: ekde la komenco
ad libitum (ad lib.): kiom dezirate; (de parolado) sen notoj
a priori: jam akceptita sen pruvo, apriora
casus belli: fakto aŭ situacio, kiu rajtigas militadon aŭ kiu militon estigas.
curriculum vitae: mallonga rakonto pri onia kariero, karieroresumo
de facto: fakte (sed ne jure). *De facto wife:* fakta edzino. *De facto recognition:* fakta agnosko.
de jure: laŭ la juro, leĝo. *De jure wife:* Edzino laŭjura
delegatus non potest delegare: Delegito ne povas delegi
de minimis non curat lex: La juro ne priatentas malgrandaĵojn
ejusdem generis: samspeca, samspece
E pluribus unum: (La devizo de Usono) El pluraj unu
ex officio: pro ofico
ex post facto: (leĝo) retroaktiva, retrovalida
expressio unius: regulo de interpretado, laŭ kiu, se estas io eksplicite dirita, oni ne povas supozi alian signifon.
ex silentio: pro malesto de kontraŭa atestaĵo
ex turpi causa non oritur actio: el fiafero ne estiĝas proceso
Habeas corpus: Vi havas la korpon. Angla juĝalvoko por akiri la liberigon de persono.
inter partes: interpartia, interpartie
ipse dixit: eldiro kies vereco estas juĝata laŭ la eminenteco de la dirinto
ipsissima verba: la faktaj, precizaj vortoj
ipso facto: per tiu fakto aŭ ago mem
lis pendens: pendanta proceso
mea culpa: mia kulpo (agnosko, ke oni kulpas)
mutatis mutandis: ŝanĝitaj ŝanĝendaĵoj, analogie
nemine contradicente (nem. con.): neniu kontraŭdirante
nisi: sub kondiĉoj pri ekvalido, ekzemple dekreto de eksedziĝo
nisi prius: se-ne-jam, juĝo de proceso civila per la reĝaj juĝistoj
novus actus interveniens: intervene nova ago
pari passu: samtempe, samnivele →

post hoc non propter hoc: ne kaŭzita de evento nur ĉar ĝi antaŭe okazis
Pro bono publico: por la bono de la popolo
Quod erat demonstrandum (Q.E.D.): Kio estis elmontrenda
rebus sic stantibus: dum la aferoj same statas
res inter alios acta: interkonsento inter aliaj personoj
sine die: (rilate aferon prokrastitan) sen fiksita dato
sine qua non: ne malhavebla kondiĉo
sub judice: sub juĝisto, ankoraŭ juĝe konsiderata
subpoena ad testificandum: atestiga asigno
sui generis: unika
sui juris: de plena aĝo kaj kapablo, sendependa
tempus non occurrit regi: la ŝtato ne estas ligita de leĝo kiu postulas, ke personoj komencu procesojn antaŭ limdato
volenti non fit injuria: volanto ne suferas

Mi intencas, estonte, kiam mi citos latinajn esprimojn, doni samtempe la esperantan tradukon. ❑

ADAMO KAJ EVA. MALGRANDA ROMANO POR KOMENCANTOJ

recenzas Bernard Golden



János Sárközi: *Adamo kaj Eva. Malgranda romano por komencantoj.* Debrecen: Debrecena Bulteno, 1993. Ilustrita de Péter Péter. 42p. Prezo: HUF50.

Legaĵo

La aŭtoro verkis romaneton kun la ŝablona titolo *Adamo kaj Eva,* kies celo estas servi kiel legaĵo por komencantoj. Ĝi estas banala amrakonto pri Eva, 17-jara lernantino, kaj Adamo, 19-jara gastlaboristo. La landoj de la du rolantoj ne estas menciitaj, do la intrigo ŝvebas en nereala ĉirkaŭmedio. Eva, kiu scias Esperanton, hazarde renkontiĝas kun Adamo, kiu komprenas nur sian gepatran lingvon, sed li pli interesiĝas pri Eva kaj volas delogi la junulinon por kontentigi siajn seksajn dezirojn. Lia unua provo seksumi kun ŝi en arbaro fiaskas, ĉar Eva rezistas. Kiam ŝiaj gepatroj forveturas, ŝi invitas Adamon en sian loĝejon, kie li sukcesas amori ŝin. La rakonto finiĝas, kiam Adamo, post kelkaj semajnoj, forlasas Evan por reiri al sia hejmlando.

La temo de tiu ĉi triviala erotikaĵo karakterizas revuon kiel *La Kancerkliniko* sed tute ne estas kutima por Esperanto-lerniloj. Ĝi neniel konvenas.

Vortprovizo

La aŭtoro uzas kiel vortprovizon la Bazan Radikaron Oficialan ellaboritan de Akademio de Esperanto. Inkluditaj estas 400 radikoj el la tri unuaj oftecgrupoj, kompletigitaj per 700 vortoj el la kvin unuaj oftecgrupoj. Vortoj ne troviĝantaj en tiu listo kaj

ne analizeblaj kiel kunmetaĵoj de vortoj en la Baza Radikaro, estas klarigitaj fine de la mallongaj ĉapitroj kaj ankaŭ sur du paĝoj post la vortoj de la Baza Radikaro. Kritikindaj estas la malprecizaj difinoj, kiujn ricevas tiuj vortoj. Ekzemple, "robo" estas "virina vestaĵo", "vango" estas "vizaĝo" kaj "vortaro" estas "libro, en kiu estas vortoj".

La lernilo estas uzebla por instruado laŭ la rekta metodo, ĉar la tuta teksto estas en Esperanto, kaj ne estas traduko de la vortoj. Sekve, lernanto devas akiri Esperantan-etnolingvan vortaron.

Lingvouzo

En la libro troviĝas lingvaj eraroj, kiuj malaltigas ĝian valoron por didaktikaj celoj. La aŭtoro, estante denaska parolanto de la hungara lingvo, ne kapablas liberigi sin de la katenoj de tiu lingvo, kiam li verkas en Esperanto. Estas evidente, ke la teksto ne estis reviziita fare de lingve kompetenta esperantisto, kiu ne estas parolanto de la hungara. Kelkaj trajtoj de "hungarsperanto" estas: ellaso de subjektaj pronomoj en subordaj propozicioj; slaveca traduko de la hungara konjunkcio *hogy* per "ke", kiam ĝi estas superflua en Esperanto; traduko de *ha* per "se", kiam la senco estas "kiam"; nekutima vortordo rezultanta de pensado en la hungara kaj skribado en Esperanto. Tiu ĉi speco de etnolingve influita Esperanto estas riproĉenda en lernilo, ĉar ĝi prezentas malbonajn modelojn por imitado.

Pli severa kritiko koncernas gramatikajn erarojn en Esperanto, ĉar ili misgvidas lernantojn. Se la regulo pri la refleksivo en Esperanto klare malpermesas ĝian uzon en la subjekto de frazo, kial skribas Sárközi "Hejme siaj amikoj ĉiam diris..."? Kial aperas la akuzativo post verbo ne signifanta almovon: "...skribu la naci-lingvan tradukon post ilin"? (La sekva frazo tekstas jene: "...skribu la nacilingvajn vortojn post la esperantlingvaj"!!!). Eĉ pli nekonsekvenca estas la traktado, kiun la aŭtoro donas al la prepozicioj "sur" kaj "je": (1) "ŝi mane montris sur sin"; (2) "ĝi montris je si"; (3) "ŝi montris je sin"!!! En la sekva frazo la uzo de la participa adverbo "sidante" estas erara, ĉar ne ekzistas persono en la subjekto: "Sed la komunaj promenadoj, paroladoj, sidante sur benko en parko jam estis ne sufiĉaj".

Takso

Krom la ĉi-supre menciitaj difektoj, ankoraŭ unu granda mispaŝo estas la intenca aperigo en la teksto de ekzemploj de nenorma lingvouzo. Temas pri fuŝe formitaj frazoj kun multaj gramatikaj eraroj, kiam Adamo komencas lerni Esperanton, kaj en ripeto de telefona konversacio kun balbutanta eterna komencanto. Estas baza principo de la eduka psikologio kaj metodologio, ke oni neniam prezentu erarojn al lernantoj, ĉar tio havas kontraŭpedagogian efikon. En lingvoinstruado, ĉiam devas esti antaŭ la okuloj kaj oreloj de lernantoj la internacia, ĝusta normlingvo. Sekve, ne estas eble rekomendi *Adamo kaj Eva* kiel lernilon por la instruado de Esperanto. Al János Sárközi mankas kompetenteco kiel pedagogo kaj talento kiel verkisto, do estas konsilinde, ke en la estonteco li dediĉu sin al agadoj, kiuj estas pli konformaj al lia nivelo de kapablo. ❑



DIVERSAĴOJ



- ***Radio 3ZZZ Melbourne: nova adreso.*** Sendu ĉiujn komunikaĵojn al Radio 3ZZZ Esperanto Programo, PO Box 1106, Collingwood Vic 3066. Telefonu (inter 1-2.30 ptm lunde): (03) 415 9123, 9124, 9125, se vi deziras aranĝi partoprenon en "talkback" sesio. Fakso: (03) 415 1818, kun atentigo: "Por Esperanto".
- ***Malnovajn ekzemplerojn de Nov-Zelanda Esperantisto kaj The Australian Esperantist*** serĉas la Esperanto- bibliotekoj de Münchenkaj Baden-Württemberg, interŝanĝe aŭ pagante. Kontaktu: Johann Pachter, Untere Volkwinhalde 9, W-7480 Sigmaringen, Germanio.
- ***Kiel partoprenon en la Jaro de la Indiĝenaj Popoloj*** AEA decidis eldoni libron pri Aborigenaj mitoj kaj legendoj. Ĉefredaktas Ralph Harry. La titolo: *La Pratempo* de Charles Mountford; enestas ankaŭ poemrakonto *La Brolgo.* Tradukis diversaj personoj kaj grupoj en Kvinslando. Detaloj aperos en la venonta numero de *Esperanto sub la Suda Kruco.*
- ***Helpu rifuĝintajn tibetajn infanojn—*** En Dharamsala (loĝloko de la Dalai-Lamao) estas "Tibet-infana vilaĝo" konstruita por 1 400 junegaj rifuĝintoj. Novaj domoj estas konstruendaj, po ~ AUD$20 000, ĉiu el ili ebligos loĝigi inter 25 kaj 35 infanojn. Ni estas invitataj partopreni en la konstruado per simbolaj "ŝtonoj", po ~ $20, por la mil ŝtonoj "konsistigantaj" unu domon. Se sufiĉe da mono estos sendita de Esperantistoj, domo ricevos la nomon "Esperanto-Domo". Donacojn sendu al Comité de Soutien au Peuple Tibétain, 3 rue Lavoisier, Bât. 3, F-93500 Pantin, Francio. Ĉekoj al "Maison de Tibet — Village Enfants Tibétains (Esperanto)". [—laŭ *Monda Forumo* Aprilo 1993 kaj *Asistilo* 12/vintro 1993.]
- ***Literaturamantoj kaj vintroamantoj*** povos speciale plezurigi sin en Katalunio ĉi-jare. La **12a Internacia Literatura Forumo** okazos en Barcelono 17-21 julio, ĝin organizas Kataluna Esperanto-Asocio kaj Kooperativo de Literatura Foiro. La ĉeftemo estas "La literatura kritiko en esperanto: inter estetika universalo kaj poetika relativo". Adreso: Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat. 290, E-08200 Sabadell, Hispanio. La vintroallogaĵo estas la 26a Katalauna Kongreso de Esperanto, 4-7 decembro, en la historiplene alloga urbeto Alcúdia en Majorko. Por detaloj, la sama adreso.
- **"Mi volas fari motorciklan vojaĝon** tra Aŭstralio kaj Nov-Zelando, kaj mi serĉas adresojn de homoj kiuj vendas aŭ ludonas motorciklojn aŭ eĉ aŭtojn. Homoj kiuj eble povas doni al mi bonajn informojn ankaŭ pri kiel organizi tiun vojaĝon, ĉar bedaŭrinde en mia profesio mi ricevos nur kvar semajnojn en unu peco." ✉ Bettina Radau, Am Pûttkamp 62, 4000 Düsseldorf, Germanio.



EL LA REGIONOJ

NSW: Margaret Chaldecott planas kvar-semajnan restadon en Kubo, komence de la 1a de julio, por instrui la arton de trikado. —El *Telopeo.*

Qld: Esperanto-Federacio de Kvinslando: Jim Fouras, Patrono de nia federacio, invitis anojn al la Parlamentejo por rostfesti kaj partopreni en posta gvidvizito de la Parlamentejo, la 28-an de aprilo. Ni spektis la ĉefajn ĉambrojn kaj kunvenejojn, kie ni samtempe ricevis klarigon pri aspektoj de parlamentaj rutinoj. Deksep anoj ĉeestis ĉi tiun ege interesan kaj pleninforman vesperon. (Noto: la anoj mem pagis por la manĝo kaj trinkaĵoj!)—Raportis Ray Ross.

La EFK planas konferenci la 11-12 de septembro ĉe la Isle of Palms, en Elanora (Ora Marbordo). Avizu pri via partopreno almenaŭ du semajnojn antaŭ la komencdato, por ke la komitato povu aranĝi la loĝadon kc.

Toowoomba: La 12an de aprilo Trevor Steele marŝis en Toowoomban. Li restis ĝis la 14a kaj ĉeestis la monatan aferkunsidon antaŭ ol li foriris okcidenten survoje al la tre malproksima marbordo de Okcidenta Aŭstralio.—El *Tereno.*

SA (Adelajdo): La konversacio de ses geesperantistoj gaje fluadis en la restoracio Raja Sayang, la 3an de majo. La etoso estis eĉ festa. ĉar la grupo rebonvenigis Patan post ties ferio en Kvinslando, ĝisis al Indrani, kiu estis forflugonta la sekvantan matenon por pasigi kvar monatojn en Kanado, kaj gratulis al Rajnero pro nova posteno—la unua en Aŭstralio, en kiu li praktikos sian propran profesion, pri industria inĝenierado.—El *Tamen Plu.*

WA (Perto): Bruno dalla Pozza, el Saipan, en la Mariana Insularo, estas esperantisto, muzikisto, komponisto. Li gajnis tri orajn medalojn en internacia ĵudo-turniro ĉe la Superdromo en Perto. Vera Payne aranĝis por li matenan festeton kaj invitis membrojn de la klubo. Bruno distris la ĉeestantaron per muziko, kantado en Esperanto, kaj ĉiuj estis ravitaj de lia personeco kaj genia talento. Ni esperas ke Bruno vizitos nin baldaŭ denove. Li estis granda inspiro.—Raportis Idyss Einihovici

Nov-Zelando—Wellington: Je la 14-a de aprilo dek unu bravuloj defiis la malvarmecon por ĉeesti la kunvenon de la Rondo. Ĉar la datreveno de la morto de D-ro L.L. Zamenhof okazos la 17-an, S-ino Gwenda Sutton legis el la gazeto de la Sud-Aŭstralia Esperanto-Societo artikolon pri la lastaj tagoj de la Majstro kiel priskribitaj de lia filo D-ro Adamo Zamenhof—tre kortuŝa rakonto. Ĉi tiun monaton S-ino Mary Richardson provizis la programon kaj elektis paroli en la Internacia Lingvo pri vere internacia floro—la irido. Mary estas konata spertulo pri la kreskado de la irido en Nov-Zelando, kaj estas unu el la motoroj de la Nov-Zelanda Irida Asocio. Ŝi prezentis diapozitivojn de 50/60 spe-

cioj de plej diverskoloraj iridoj, alloge fotografitaj de ŝia edzo.—Informis Mary Richardson kaj William Aldridge.

Al la maja kunveno la prezidanto, S-ro Bill Aldridge, bonvenigis vizitanton, S-ron Arlen Baden, el Novjorko, konsilisto en elementa lernejo. S-ro Fred Adams estris la vesperan programon, parolante pri ŝanĝoj rilate edukadon en Nov-Zelando. Li esprimis dubojn rilate la nuntempan sistemon uzatan por raporti la taksadon de la sukceso de studantoj, kaj la ĝenon kaŭzatan de la nova matematiko al kaj la studanto kaj la instruisto. Ankoraŭ pensiga afero.

La Prezidanto S-ro Bill Aldridge bonvenigis la ĉeestantojn al la junia kunveno de la Rondo kaj, je la instigo de S-ino Gwenda Sutton, invitis diskuton rilate kelkajn aferojn pri kiuj UEA nuntempe okupiĝas. Vigla diskuto sekvis. La parolanto por la vespera programo estis S-ro David Ryan, kiu elektis pritrakti la demandon: Ĉu Nov-Zelando estu monarkio aŭ respubliko? Li sugestis, flanke, ke estus necese atendi la decidon tiurilate de Aŭstralio, ĉar certe Nov-Zelando agus kontraŭe!—Raportis Mary Richardson. ❑

LA NZEA-KONGRESO
KOSTOJ

La Esperanto-Kongreso de NZEA okazos de 1:30 ptm en mardo 4 januaro ĝis 4:30 ptm en dimanĉo 9 januaro 1994, ĉe *Saint Francis Retreat Centre* en Aŭklando. Ĉi tiuj kostoj estas por unulitaj dormĉambroj, litaĵoj, bantuko, ĉiuj manĝoj, tepaŭzoj, bankedo, diskut-ĉambroj, kaj kongres-kotizo (sed ne la ekskursoj).

La jenaj rabataj prezoj estas por la tuta kongreso, kaj rilatas al registro kaj antaŭpago de $100 (kiu estas nerepagebla) dum la citita monato:

Registro kaj antaŭpago dum Septembro..... $250
Registro kaj antaŭpago dum Oktobro..... $270
Registro kaj antaŭpago dum Novembro..... $290
Registro kaj antaŭpago dum Decembro.....$310

Por kongresanoj kiuj restos dum nur kelkaj tagoj la kosto estas $60 por ĉiu tago, plus $10 se la tempo inkludas la bankedon en sabato 8 januaro. Por kongresanoj kiuj ne tranoktos, aŭ/kaj restos dum nur partoj de tagoj, la kostoj estas $10 por ĉiu tago aŭ parto de tago, plus kosto de manĝoj: lunĉo $10, vespermanĝo $15, bankedo $25. (Ĉiuj prezoj estas en novzelandaj dolaroj. NZ $1.00 = proks. Aŭs $0.80.)

Estos tri ekskursoj dum la kongreso. Dum la posttagmezo de merkredo oni vizitos centron de historiaĵoj en okcidenta Aŭklando, kaj spektos filmon. Dum la tuta vendredo la kongresanoj boatvoaĝos inter la multaj insuloj en Golfo Haŭraki kaj ties kajoj. Estos duhora restado sur Insulo Rakino por piknika lunĉo kaj promenado laŭ unu el la plej belaj malgrandaj insuloj en la Ekstera Haveno. Dum la mateno de dimanĉo oni aŭtomobilos tra la kamparo por veturo per la modela fervojo

ĉe Glenbrook, kiu situas sudokcidente de Aŭklando, sude de Haveno Manukaŭ.

Sendu viajn antaŭpagojn por la kongreso al: Kongresa Kasistino, PO Box 41-172, St Lukes, Auckland 1003, Nov-Zelando. En la venonta *Esperanto Sub La Suda Kruco* ni aperigos la kotizojn por la tri ekskursoj.

Brian Fox, Prezidanto, NZEA.

CRAAN KORREKTO

La Kongreso kaj Somerlernejo de AEA okazos en Adelajdo, januaro 1994. Pro nekomprenebla kaŭzo, sur p.24 de nia majo-junia numero la teksto lokigis ĝin en Kvinslando, terurante la Toowoomba-anojn. Odlo Bokserp insistas ke li ne respondecas pri la eraro, sed via redaktoro dubas.

Respondoj por la Citaĵkvizo

1g, 2c, 3b, 4e, 5ĵ, 6i, 7f, 8h, 9ĉ, 10a, 11d, 12ĝ, 13ĥ, 14j

ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

estas komuna eldonaĵo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio.

La Aŭstralia Esperanto-Asocio:

Prezidanto: Kep Enderby, 2 Phoebe St, Balmain NSW 2041.

Sekretario: Ray Ross, 41 Agnes St, Sunnybank Qld 4109.

Kasisto: Owen Loneragan, 16 Deverell Way, Bentley WA 6102.

Membrokotizoj: AUD$25 por individuo, klubo, kc; $30 por familio (ĉiuj ĉe la sama adreso) $15 (minimume) por pensiulo aŭ studento. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto.

La Nov-Zelanda Esperanto-Asocio:

Prezidanto: Brian Fox, 634 South Titirangi Rd., Auckland 1007. ☎ (09) 817 8244.

Sekretario: Jo Knight, PO Box 41-172, St Lukes, Auckland 1003. ☎ (09)-846 2601

Kasisto: Jackie Fox, PO Box 41-172, St Lukes, Auckland 10033.

Membrokotizoj: NZ$30 por individuo; $40 por geedza paro; $10 por studento aŭ junulo (< 20-jara). Kluboj po $1 por ĉiu ano, maksimume $15.

Ekster Aŭstralazio abono al *Esperanto sub la Suda Kruco* kostas AUD$40 (50 ned. gld.), kio inkludas aerpoŝtan sendadon. Por aboni pagu en la konton ĉe UEA de la Libroservo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio citante UEA-kodon aeal-w, kaj samtempe avizu la Libroservon de AEA.

Bonvolu avizi la redaktoron de *Esperanto sub la Suda Kruco* : D-ro Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Bakers Hill WA 6562, Aŭstralio, se via adreso estas neĝuste presita sur la adresslipeto, aŭ se vi ŝanĝas vian nomon aŭ/kaj adreson. Sendu ĉiujn komunikaĵojn, artikolojn, librojn por recenzo kc. al la redaktoro.

Wholly printed in Australia. Computer typeset by Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Bakers Hill WA 6562. Printed by Snap Printing, 921 Albany Highway, Victoria Park East WA 6101.

If undeliverable return reply paid to
D. Broadribb
46 Great Eastern Highway
Bakers Hill WA 6562
Australia

ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO
Vol. 1, Nº 4, Jul-Aŭg. 1993

Print Post Approved
PP631048/00005

SURFACE MAIL

Postage Paid Western Australia

Juan Antonio Giménez
Pl. Pintor Segrelles, 1-B-19.ª
46007 VALENCIA